

# L' ESPERANTO

Monata bulteno de la Genta Esperanto-Grupo.  
Bulletin mensuel du Groupe Espérantiste Gantois.  
Maandelijksch tijdschrift van den Gentischen Esperantisten Groep.

---

REDAKCIO :

RÉDACTION :

REDACTIE :


Michel Sebruyns

34, Rue de Gand,

MONT-ST-AMAND

lez GAND.

---



---

ADMINISTRACIO :

kaj ANONCOJ :

ADMINISTRATION

et ANNONCES :

ADMINISTRATIE en  
AANKONDIGINGEN :

Henri Petiau

60, Boul<sup>d</sup>. St. Liévin

GAND.

---

---

**Enhavo:** La movado en Gento. - Korespondajoj - Priskribo pri Gento.  
: Intima festo. - Spritaĵoj. - Amuzaĵoj - Humoraĵo. - Interŝanĝado.  
Bibliografio. - Por la filatelistoj.

**Sommaire:** Nouveau Cours - Exposition de Gand 1913. - Cathé-  
chisme de l'Espéranto. - Cours d'Espéranto.

**Inhoud:** Nieuwe leergang. - Tentoonstelling van Gent 1913. - Cate-  
chismus van Esperanto. - Leergang van Esperanto. - Belangrijk bericht!

---

Unu numero 0.10 fr. Le numéro 0.10 fr. Het nummer 0.10 fr.

GENTO 1913.

# L' ESPERANTO

Monata bulteno de la Genta Esperanto-Grupo.

Redakcio :

MICHEL SEBRUYNS

RUE DE GAND, M<sup>l</sup> S<sup>t</sup> AMAND (Gand.)

Administracio kaj Anoncoj :

HENRI PETIAU

60, BOULEVARD ST. LIÉVIN, GAND.

Ne presitajn manuskriptojn oni ne resendas. La redakcio konservas por si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn.

Por ĉio, kio koncernas la redakcion, sin turni eksklusive al la ĉefredaktoro S<sup>ro</sup> M. SEBRUYNS, 34, Rue de Gand, Mont St. Amand, (Gand.)

Un nouveau cours d'Espéranto pour commençants a lieu le Jeudi à 8 h. du soir au local "Salle des Notaires.,,

L'entrée est libre et gratuite tant pour dames et demoiselles que pour messieurs.

Iederen Donderdag avond om 8 uren heeft een leergang van Esperanto plaats in het lokaal "Notarissenzaal.,,

De leergang vrij en kosteloos, is toegankelijk zoo voor damen als voor heeren.

Exposition de Gand  
1913.

Tentoonstelling van  
Gent 1913.

Les promeneurs qui visitent les chantiers de l'Exposition de Gand 1913, sont frappés de l'immense espace occupé par les multiples constructions qui se dressent de tous côtés, et une question se présente tout naturellement à leur esprit : quelle est l'étendue du terrain occupé par l'Exposition ?

Voici à ce sujet quelques détails qui probablement présenteront de l'intérêt pour nos lecteurs,

De wandelaars, die de werkplaatsen der Tentoonstelling van Gent bezoeken, zijn getroffen door de onmetelijke ruimte, ingenomen door de talrijke gebouwen, die overal oprijzen, nu gansch natuurlijk komt bij hen de vraag op : welke is de uitgestrektheid van het terrein der tentoonstelling ?

Ziehier, nopens dit punt, eenige bijzonderheden die waarschijnlijk des lezers belang zullen opwekken,

La superficie totale de l'Exposition est de 120 hectares. Dans ces chiffres est compris le Parc de la Citadelle qui compte 33 hectares.

Une des particularités de cette Exposition, c'est que presque tout cet immense terrain sera couvert de constructions. On n'y verra pas de vastes terrains presque vides qui séparent quelques-unes des installations et qui lassent le visiteur toujours avide de voir de nouveaux produits exposés.

A part la superbe et vaste cour d'honneur, et l'immense avenue de 900 mètres de longueur qui s'étend depuis le viaduc du chemin de fer jusqu'au village moderne, toute la partie qui s'étend au-delà de la rue des Moineaux jusqu'à Maltebrugge sera couverte de constructions.

Tout autour de la Cour d'honneur s'étendent les superbes halls de l'industrie qui couvrent environ six hectares. Plus loin dans l'avenue centrale se dressent l'annexe de la section française, le pavillon allemand, la Perse, l'Italie, le Congo, et son superbe Panorama, le pavillon des quatre grandes villes : Bruxelles, Anvers, Liège et Gand, la vieille Flandre et le village moderne.

De l'autre côté nous avons le hall des machines, le petit outillage, les travaux de la femme, la photographie et le superbe et gigantesque Palais des Beaux-Arts, qui occupe un hectare et demi.

A gauche se trouve la section Anglaise qui occupe aussi plus de quinze milles mètres carrés.

En passant de là par le viaduc on arrive au Parc en traversant une rue

De totale oppervlakte der Expositie is 120 Hectaren. Daarin is begrepen het Park, dat 33 Hectaren telt.

Eene der bijzonderheden van deze Tentoonstelling, 't is dat bijna geheel dat onmetelijk terrein zal bedekt worden met gebouwen.

Men zal er geene uitgestrekte ledige gronden aantreffen, die eenige der installatiën van elkander scheiden en die den bezoeker vermoeien, begeerig om altijd maar andere en nieuwe tentoongestelde voorwerpen te bezichtigen.

Buiten den prachtige & uitgestrekte eerekoer, en de overgroote laan van 900 meters breedte, die zich uitstrekt van aan de viadukt des ijzeren wegs tot aan het hedendaagsch dorp, zal geheel het deel, begrepen tusschen de Musschenstraat en Maltebrugge bedekt zijn met gebouwen.

Rondom den eerekoer liggen de hallen der nijverheid die ongeveer zes hektaren beslaan. Verder in de middenlaan staan : de afhankelijkheden der Fransche afdeeling, het Duitsch paviljoen, Perzië, Italië, de Congo en zijn prachtig panorama, het paviljoen der vier groote steden : Brussel, Antwerpen, Luik en Gent, Oud-Vlaanderen en het hedendaagsch dorp.

Langs de andere zijde zien wij : de hall der machiën, het klein gereedschap, de vrouwenarbeid, de fotografie en het prachtig en reusachtig Paleis der Schoone Kunsten, dat 1 1/2 Ha. beslaat.

Links bevindt zich de Engelsche afdeeling, die ook meer dan vijftien duizend m. vk. heeft.

Daar voorbijgaande langs den

en pente où s'étalent de chaque côté de charmantes constructions de styles les plus variés.

Enfin, au Parc se trouveront les principales attractions telles que Water-chûte, Village Sénégalais, rue du Caire, chemin de fer électrique, théâtre des Variétés, etc. etc.

Tous ces pavillons encadrés par les superbes massifs de verdure du Parc, offriront aux yeux des visiteurs le plus charmant coup d'œil.

Dans notre prochain numéro nous donnerons quelques détails sur la vieille Flandre.

A. M.

### Cathéchisme de l'Espéranto.

(suite)

18. De quoi se composent la grammaire, la syntaxe, l'etymologie et la dérivation des mots en Esperanto?

De seize règles.

19. En quoi consiste l'étude complète de cette langue?

En l'étude des 16 règles susdites et d'environ 2000 mots racines dont les 86/100 se retrouvent dans les langues latines et germaniques.

20. Que s'en suit-il pour la grande majorité de nos concitoyens, qui parlent les deux langues nationales?

Que l'étude de l'Espéranto est pour eux d'une facilité extraordinaire.

21. La langue universelle est-elle accessible à toutes les bouches, à toutes les nationalités?

Oui; car l'auteur a éliminé avec soin tout ce qui pouvait constituer

viadukt, komt men in het Park, eene hellende straat doortrekkende, wier beide zijden bezet zijn met bevallige gebouwen, in de verscheidenstestijlen.

Eindelijk, het Park zal de verschillende aantrekkelijkheden bevatten, zooals : de Water-chûte, het Sénégalisch dorp, eene straat in Kaïro, Elektrische spoorweg, variétéstheater enz. enz.

Al die paviljoenen, ingelijst door de prachtige looverdaken des Parks bieden aan het oog des toeschouwers een verrukkend schouwspel.

In ons volgend nummer geven wij eenige bijzonderheden over Oud-Vlaanderen.

### Catechismus van Espéranto.

(vervolg)

18. Waaruit bestaat de spraakleer, de zinsbouw, de woordvorming en de woordafleiding in Esperanto?

Uit 16 regels.

19. Waaruit bestaat de volledige kennis dezer taal?

Uit de studie des 16 bovengenoemde regels en van ongeveer 2000 grondwoorden, waarvan 86/100 in de latijnsche en germaansche talen te vinden zijn.

20. Wat volgt daaruit voor de groote meerderheid onzer stadgenooten, die de twee landstalen spreken?

Dat de studie van Esperanto voor hen van buitengewoon gemak is.

21. Is de wereldtaal voor iedereen spreekbaar en voor alle nationaliteiten?

Ja, want de schepper van Esperanto

une difficulté de prononciation pour l'une ou l'autre nation.

22. *Cela a-t-il été prouvé?*

Parfaitement! D'abord dans les 8 congrès internationaux, ou aucune confusion, aucune difficulté relative à la prononciation et à la compréhension se produisit.

Tous les jours, les *espérantistes* de tous les pays des cinq parties du monde se parlent et se comprennent avec la plus grande facilité.

23. *Nommez quelques autres systèmes de langues internationales, parus avant l'Esperanto.*

Voici les principaux: le Volapük, la Langue Bleue, le Solresol, le Néo-Latin, le Sanscrit.

24. *Que savez-vous de ces langues?*

Ils eurent quelque succès à leur apparition, mais toutes tombèrent dans l'oubli, à cause de leur peu d'internationalité et surtout de leur difficulté.

25. *Qu'est-ce que l'« Ido »?*

C'est un projet de langue auxiliaire universelle, calqué sur l'Esperanto, mais beaucoup inférieur à celui-ci sous tous les rapports.

26. *Qui en fut l'auteur?*

Le Marquis Français A. de Beaufront, qui fut d'abord le plus fervent propagateur de l'Esperanto, et qui écrivit à propos de celui-ci: « Tout ce qu'on fera en fait de langue universelle, n'égalerà pas l'Esperanto, ou n'en sera qu'un vulgaire plagiat ».

27. *L'Ido a-t-il chance de réussir?*

Non, car à cause de sa grande imperfection la presque totalité des

heeft zorgvuldig alles vermeden wat eene moeilijkheid voor welbdanige natie zou hebben kunnen wezen.

22. *Is dat bewezen geworden?*

Volkomen! Vooreerst in de 8 internationale kongressen, waar geene verwarring, geene moeilijkheid betrekkelijk de uitspraak of het verstaan zich voordeed.

Nu nog alle dagen spreken en verstaan zich de *esperantisten* uit alle landen der 5 werelddeelen met het grootste gemak.

23. *Noem eenige andere stelsels van hulpwereldtalen, verschenen vóór het Esperanto.*

Ziehier de bijzonderste: het Volapük, de Blauwe Taal, het Solresol, het Nieuw-Latin, het Sanscrit.

24. *Wat weet gij over die talen?*

Zij hadden allen een zekeren bijval bij hun verschijnen, maar allen vervielen, doordien ze niet internationaal genoeg waren en voornamelijk omdat ze te moeilijk om leeren waren.

25. *Wat is het « Ido »?*

It is een ontwerp van internationale hulpwereldtaal, bewerkt naar het Esperanto, maar veel minderwaardiger dan dit onder alle opzichten.

26. *Wie was er de maker van?*

De Fransche Markies A. de Beaufront, die vroeger een der ieverigste verspreiders was van Esperanto en zelfs schreef: « Al wat men zal voortbrengen, op gebied van wereldhulptaal zal nooit Esperanto gelijken of zal er maar een gemeen namaaksel van zijn ».

27. *Heeft « Ido » kans van te gelukken?*

Geenszins, want om reden zijner groote onvolmaaktheid, bleef de

*espérantistes* est restée fidèle à la langue du Docteur Zamenhof et le nombre d'adeptes de l'« Ido » est insignifiant, en effet le mouvement *ido* manque d'internationalité puisqu'il se borne à la France, la Belgique et l'Allemagne.



## Cours d'Esperanto

Corrigé de la Traduction de la 2<sup>e</sup> Leçon.

1. Est-ce que Marie est l'ennemie de la Française? 2. L'époux de Louise dissipe. 3. Il abaisse les bras. 4. La tante blâmera les garçons malpropres. 5. On achètera un grand pain. 6. Heureusement elle a gagné! 7. Elles (ils) se promenèrent dans la maison avec les Allemandes. 8. Est-ce que vous affirmerez? 9. La mère de Michel va mal, mais hier elle se portait bien. 10. Achèteras-tu des tables ou des chaises? 11. Les filles du prince sont faibles. 12. Je sais, qu'on ne boira plus! 13. Où se trouvent (couchent) les lionnes? 14. Des oiseaux chantaient gaîment sur les arbres.

### 3<sup>e</sup> LEÇON

#### Degrés de Signification.

Les degrés de signification pour les adjectifs, aussi bien que pour les adverbes se forment de la manière suivante:

A) COMPARITIF

a) d'égalité.

par: tiel, kiel,

bijna algeheelheid der *Esperantisten* getrouw aan de taal van Dokter Zamenhofen het getal der aanhangers van « Ido » is onbeduidend; inderdaad; de *Idistische* beweging is ver van algemeen of internationaal te zijn, want zij beperkt zich tot slechts drie landen: Frankrijk, België en Deutschland.

## Leergang van Esperanto

Verbetering der Oefening op de 2<sup>e</sup> Les.

1. Is Maria de vijandin van de Fransche vrouw? 2. De echtgehoor van Louisa verspilt. 2. Hij laat de armen zakken. 4. De moei zal de vuile knapen laken. 5. Men zal een groot brood koopen. 6. Gelukkiglijk heeft zij gewonnen! 7. Zij wandelen in het huis met die Duitsche. 8. Zult gij bevestigen? 9. De moeder van Michaël gaat slecht, maar gisteren stelde zij het wel. 10. Zult gij tafels of stoelen koopen? 11. De dochters van den prins zijn zwak. 12. Ik weet, dat men niet meer zal drinken! 13. Waar liggen de leeuwinen? 14. Vogels zongen vroolijk op de boomen.

### 2<sup>e</sup> LES

#### Trappen van Beteekenis.

Men vormt de trappen van beteekenis, zoowel voor de hoedanigheids- als voor de bijwoorden op de volgende manier:

A) VERGELIJKENDE trap

a) van gelijkheid.

door: tiel, kiel,

Ex.-Voorb. — Karolo estas tiel granda kiel vi (Charles est aussi grand que vous-Karel is zoo groot als gij); Mario kantas tiel bone kiel Jozefo (Marie chante aussi bien que Joseph-Maria zingt zoo goed als Jozef.)

b) de supèriorité  
par : pli ol

b) van meerderheid  
door : pli ol

Ex.-Voorb. — Karolo estas pli granda ol vi (Charles est plus grand que vous-Karel is grooter dan gij); Mario kantas pli bone ol Jozefo (Marie chante mieux que Joseph-Marie zingt beter dan Jozef.)

c) d'infèriorité  
par : malpli ol

c) van minderheid  
door : malpli ol

Ex.-Voorb. — Karolo estas malpli granda ol vi (Charles est moins grand que vous-Karel is min groot dan gij); Mario kantas malpli bone ol Jozefo (Marie chante moins bien que Joseph-Marie zingt min goed dan Jozef.)

B) SUPERLATIF  
a) de supèriorité  
par : la plej el

B) OVERTREFFENDE trap  
a) van meerderheid  
door : la plej el

Ex.-Voorb. — Karolo estas la plej granda el ĉiuj (Charles est le plus grand de tous-Karel is de grootste van allen); Mario kantas la plej bone el ĉiuj (Marie chante le mieux de tous-Maria zingt het best van allen.)

b) d'infèriorité  
par : La malplej el

b) van minderheid  
door : La malplej el

Ex.-Voorb. — Karolo estas la malplej granda el ĉiuj (Charles est le moins grand de tous-Karel is de minst groote van allen); Mario kantas la malplej bone el ĉiuj (Marie chante le moins bien de tous-Maria zingt het minst goed van allen.)

c) absolu  
par : tre

volstrekt  
door : tre

Ex.-Voorb. — Vi estas tre granda (Vous êtes très grand-Gij zijt zeer groot); Mario kantas tre bone (Marie chante très bien-Maria zingt zeer goed.)

### Suffixe Ar.

Cette suffixe, soudée au radical du mot, sert à désigner une collection, un assemblage.

Ex.-Voorb. — Arbo (arbre-boom); arbaro (bois-bosch); Ŝipo (vaisseau-schip); ŝiparo (flotte-vloot); Soldato (soldat-soldaat); soldataro (armée-leger); Haro (cheveu-een haar); hararo (chevelure-het haar).

### Achtersvoegsel Ar.

Dit achtersvoegsel, gevoegd bij het stamwoord beduidt eene verzameling, eenen hoop.

### Suffixe II.

Cette suffixe indique l'objet, l'instrument, l'outil avec lequel on fait l'action, exprimée par la racine.

Ex.-Voorb. — Pumpi (pomper-pompen); pumpilo (pompe-pomp); Kovri (couvrir-bedekken); kovrilo (couverture-deksel); Stampi (cacheter-stempelen) stampilo (cachet-stempel); Ludi (jouer-spelen); Ludilo (jouet-speelding); Laksi (purger-purgeeren); Laksilo (purger-purgeermiddel);

### Interrogation indirecte.

Le mot français «si» se traduit localement en Espéranto par «ĉu» dans une interrogation indirecte.

Ex. - Voorb. — Mi ne scias, ĉu li venos. (Je ne sais pas, s'il viendra. - Ik weet niet, of hij zal komen.) Ĉu vi scias, ĉu li skribos? (Savez-vous, s'il écrira? - Weet gij, of hij zal schrijven?)

### Impératif & Subjectif.

Ces deux modes du verbe se forment en ajoutant «u» au radical.

Ex. - Voorb. — Ŝlosu la pordon. (Fermez la porte à clef. - Doe de deur op slot.) Ili kantu. (Qu'ils chantent. - Dat zij zingen.) Ni ne kudru. (Ne couvrons pas. - Laat ons niet naaien.) Mi volas, ke ŝi kudru. (Je veux qu'elle couse. - Ik wil, dat zij naaie.) Ne malamu lin. (Ne le laissez pas. - Haat hem niet.)

### Préfixes : Bo, Ge, Pra.

«Bo» marque la parenté par mariage.

Ex. - Voorb. — Patro (père - vader.) Bopatro (beau-père - schoonvader.) Filino. (fille - dochter.) Bofilino. (belle-fille - schoondochter.)

«Ge» marque la réunion des deux sexes.

Ex. - Voorb. — Frato (frère - broeder.) Gefratoj. (frère «s» et sœur «s» - broeder «s» en zuster «s») Sinjoro. (monsieur - heer.) Gesinjoroj (messieurs et mesdames - dames en heeren.) Edzo. (mari - echtgenoot.) Gedzoj. (les époux - de echtgenooten.) Patro. (père - vader.) Gepatroj (parents - ouders.) Bogepatroj. (beaux-parents - schoonouders.)

«Pra» veut dire «bis» ou «arrière».

Ex. - Voorb. — Avo. (grand-père. - grootvader.) Praavo. (arrière-grand-père. - overgrootvader.) Nepo. (petit-fils - kleinzoon.) Pragenepoj (arrière-petits-fils et petites-filles. - achter-kleinzonen en kleindochters.)

### Achtersvoegsel II.

Dit achtersvoegsel, duidt aan het voorwerp, het tuig of het werktuig, waarmede men de daad verricht, door den stam uitgedrukt.

### Onrechtstreeksche ondervraging.

In eene onrechtstreeksche ondervraging wordt het vlaamsch woordje «of» in Esperanto vertaald door «ĉu».

### Gebiedende & Bijvoegende wijzen.

Deze twee wijzen van 't werkwoord worden gevormd door «u» bij den stam te voegen.

### Voorvoegsels : Bo, Ge, Pra.

«Bo» duidt het verwantschap door huwelijk aan.

## Vocabulaire.

Ĉambro, (chambre - kamer.) Ŝtupo, (marche - trede.) Vorto, (mot - woord.) Rekompensi, (récompenser - beloonen.) Peti, (prier ou demander - bidden of verzoeken.) Respondi, (répondre - antwoorden.) Danki, (mercier - bedanken.) Voli, (vouloir - willen.) Vendi, (vendre - verkoopen.) paroli (parler - spreken); Riĉa (riche - rijk); Juna (jeune - jong); Tiu (celui - là - die of dat of geen); Tiu-ĉi (celui-ci - dit of dees); Ĉiu (chaque - ieder); Ĉiuj (tous - alle); Johano (Jean - Jan); Antonio (Antoine - Antoon); Viŝi essuyer - afvagen); Tranĉi (couper - snijden); Ludi (jouer - spelen); Bezoni avoir besoin de - noodig hebben); Ricevi (recevoir - krijgen of ontvangen); Muziki (faire de la musique - muziek maken); Balai (balayer - vagen); Luli (bercer - wiegen); Laksi (purger - purgeeren); Jen (voilà - ziedaar); Se (si - of); Sen (sans - zonder); Al (à - aan.)

## Traduction.

1. La franca soldataro estas tre granda, pli granda ol la belga. 2. Ĉu vi scias, ĉu la reĝino fartas bone? Jes, ŝi fartas plej bone ol la avino de Antoniano. 3. Diru tiun vorton france, germane kaj esperante. 4. Kie, kuŝas la vortaro de la bogepatroj? 5. Geknaboj, estu bonaj kaj skribu. 6. La pranepo de la maljuna Antonio havas tre belan pafilon. 7. Balau la ĉambraron. 8. La granda muzikilo estas pli bona ol la malgranea. 9. Ŝi ne kudras plu, ŝi bezonas pli rektajn krudrilojn. 10. La kovriloj de la lulilo ne estas puraj. 11. Jen (estas) laksilo. 12. Ĉu oni bezonas balailon? 13. La ĝeinfanoj ne ludu sen ludiloj! 14. Ili malŝlosu la pordojn de la ĉambroj.

## Belangrijk Bericht!

*Vele personen, 't zij Hollanders, 't zij Gentenaars, voornamelijk werklieden, die de Fransche taal niet of slechts gedeeltelijk machtig zijn, drukken ons hun spijt uit onze leergangen niet te kunnen volgen, daar de voertaal tot hiertoe het Fransch was.*

*Het bestuur van den Esperantisten-club, dat niet beters vraagt dan iedereen in staat te stellen de wereldtaal aan te leeren, heeft besloten, voor de Vlaamschsprekende bevolking van Gent eenen leergang van Esperanto in te richten. De lessen zullen gegeven worden door eenen Vlaamschen leeraar die als uitsluitende voertaal het Vlaamsch zal gebruiken.*

*De leergang zal worden aangevangen, van zoohaast zich slechts vijftien personen hebben doen inschrijven. Zijne toetreding zenden naar het lokaal: Notarissenzaal, Lieven Bauwensplaats, Gent, of aan den schrijver,*

M. HENDRIK PETIAU, Sint-Lievenslaan, 60, Gent.

## La Movado en Gento.

La apero de nia Bulteno estas tre favore akceptata; nia organo, disdonata en ĉiuj gravaj kunvenejoj de la urbo altiras multe da scivolemaj rigardoj, kaj la propagando farita de ĝi estos sendube tre fruktodona. Ĝia aspekto estas ja luksa kaj alloga kaj ĝia enhavo interesa kaj leginda. La preseraroj, tiel komunaj en la esperantista gazetaro, estas feliĉe malmultnombraj!

Multaj aproboj kaj kuragigoj - kies du ĉefaj aperis en nia dua numero - alvenis ĉe la redakcio; ili estas la plej taŭgaj pruvoj de la eikeco de nia organo.

Ankaŭ niaj geanoj multe ŝatas sian bultenon, kiu estos bona propagandilo en iliaj manoj. Efektive: armitaj de tiel bona batalilo ili povas sentime kontraŭstari kaj kontraŭbatali la plej skeptikan indiferentulon aŭ la plej frenezan kontraŭulon!

La du naciaj lingvoj ricevis samajn rajtojn: tio kontentigos la partianojn de ambaŭ kaj estas plia pruvo, ke Esperanto ne nur respektas la gepatrajn lingvojn sed estas plej taŭga rimedo por ilia restarigo kaj konservo.

La redakcia komitato dankas ĉiujn, kiuj helpis al la starigo de la Bulteno kaj precipe tiujn, kiuj kolektadis - je kiom da oferoj kaj malfacilaĵoj! - la anoncojn, kiuj ebligis la kreadon de nia ĵurnalo. Ĝi promesas ke ĝi laborados kaj klopodados por igi nian organon plej interesa, plej leginda, plej perfekta.

—o—

Ni havas la plezuron sciigi al niaj gegrupanoj ke, dank' al la infuo de nia respektata Honora Prezidanto, estos rezervata en nia Ekspozicio fako por Esperanto.

—o—

Ni faras varman alvokon al la sindonemo de ĉiuj niaj membroj, por ke ili plej regule kiel eble, ĉestu niajn ĉiusemajnajn kunvenojn. La Esperantista-Semajno rapide alproksimiĝas kaj estas jam tempo por ekdisdoni, kaj eklerni la rolojn de la Teatraĵetoj, kiuj ni intencas ludi dum nia Semajno.

—o—

Ni rememorigas, ke la kongresa karto por nia Esperantista Semajno, kiu nur kostas 1 Sm. (2.50 fr.) utilos kiel SENPAGA ENIRRAJTIĜILO en la Ekspozicion, dum la tuta daŭro de la Semajno. Do, ankaŭ ne-esperantistoj havas intereson aniĝi!

## KORESPONDAĴOJ

Gento, la 25<sup>an</sup> de Decembro 1912.

Estimata Sinjoro,

Mi estas vere feliĉa ke la apero de monata organo por la membroj de nia grupo havigas al mi la okazon esprimi en ĝi kelkajn ideojn pri la esperanta movado aŭ propagando.

Ne parolante pri tiuj anoj, kiuj lernas Esperanton kiel tempopasigilon aŭ por ordinara interparolado, ekzistas ankaŭ aliaj, kiuj deziras akiri tiun lingvon por komercaj celoj. Mi apartenas al ĉi-tiu lasta kategorio, kaj multe penadas por sciigi pri ĉio interrilate kun la komerca fako. Por ke oni povu atingi tian celon, oni kompreneble devas uzi librojn speciale kreitajn tiucele. Sed, ho ve! dum ekzistas kvantege da gramatikoj kaj libroj pri scienco, religio, filozofio, belartoj, historio, muziko, teatraĵoj, k. t. p. malmulte da verkistoj okupas sin pri la kreado de kelkaj bonaj komercilibroj. Ĉiuj ĝuantaj iom da aŭtoritato en la mondo de la instruistoj aŭ de la literaturistoj pretendas fariĝi kreintoj de gramatiko, de krestomatio, de vortaro, aŭ de radikaro, k. t. p. (ne parolante pri la literaturajoj aŭ romanoj ĉiulandaj kies nombro jam estas grandega kaj kiu kreskas ĉiutage), sed tre malmulte da ili dediĉas je tiu parto, tiel interesa por la kreado de novaj kaj daŭraj (mi substrekas la vorton) interrilatoj en la komerca mondo. Mi tra legis la plimulton el la katalogoj de la plej konataj esperantistaj libroj francaj, anglaj, germanaj, rusaj, svedaj kaj hispanaj kaj la solaj komercaj verkoj kiujn mi eltrovis el tiu amaso da lernolibroj esperantaj estas la sekvantaj:

1. L. Marisseaux. — Cours Commercial d'Espéranto.
2. J. Borel. — Komercia Korespondo.
3. Res Sudria. — La Komercia Sekretario.
4. Berthelet et Lambert. — Komercaj leteroj.
5. E. Looze. — Esperanto im Verkehr

Estas ĉio!!... Kiel ebligi al tiu, en tiaj kondiĉoj, akiri la komercan stilon? El la suprecitaj libroj nur du estas vere interesaj, la aliaj, kvankam bonaj, ne estas sufiĉe detalaj. Tamen ni ĉiam aŭdas diri ke la Esperanta lingvo estas ilo multepova por la disvastigo de la komercaj interrilatoj, do, mi opinias, ke nia aro da esperantaj verkistoj devus labori pli multe en tiu rilato kaj helpi esike la lernemulojn je ilia deziro perfektigi pri tiu interesa fako.

Estas bedaŭrinde ke la diverslandaj verkistoj nescias, ke en la 3<sup>a</sup> Kongreso de la Italaj Esperantistoj okazinta en Verona la 7<sup>an</sup> kaj 8<sup>an</sup> de Aŭgusto 1912 oni unuvoĉe aprobis la sekvantan proponon: « La tria Kongreso de Italaj Esperantistoj, konsiderante ke enkonduko de Esperanto en la komerecon estas necesa afero por praktike atingi la esperantan celon, kaj por esike propagandi Esperanton rilate al ĝia interna ideo, esprimas la deziron ke dank'al klopodoj de bonvolemaj samideanoj efektiviĝu ĉi tiu enkonduko ».

Nu, Sinjoroj, verkistoj, faru energia movo en tiu direkto:

Mi do esprimas la deziron ke nia redakcia komitato dediĉu parton, ho, eĉ nur malgrandan parton, de nia monata organo al komerca fako. Mi tre volonte metas min je la dispono de nia administracio por helpi ĝin laŭ mia kapableco.

Jozefo.

## Priskribo de la urbo GENT.

### Ĉefaj Monumentoj.

Daŭrigante nian promenadon tra la flandruja strato, ni baldaŭ ekvidas la

#### Kastelon de Gerardo la Diablo.

estas malnova fortikigita sinjora kasteleto el la 13<sup>a</sup> jarcento, kiu nun estas uzata kiel konservejo de la ŝtataj arĥivoj. Ĝi enhavas belegan kripton mezurantan 36 metrojn je longo kaj 16 metrojn je larĝo. La kasteleto estis difinita kiel lernejo la 14<sup>a</sup> kaj 15<sup>a</sup> centjaroj, poste kiel seminario kaj en 1773 kiel frenezulejo. Por viziti la Kastelon sin turni al la pordisto. Ĝi estas malfermita ĉiutage de la 9<sup>a</sup> matene ĝis la 3<sup>a</sup> posttagmeze, kaj oni pagas 30 centimojn po persono.

Daŭrigante laŭlonge la Kastelo, ni alvenas al la

#### Sankta Bavo Placo

kie ni ekvidas la

#### Flandran Teatron

novstila konstruaĵo nur de la jaro 1897/98. Ĝi havas belan fronton ornamitan de belaj pentraĵoj.

Trairante la placon ni admiras la

#### Sonorilturon aŭ Beifridon, aŭ Urbdomon.

la simbolo de la urba libereco, datumanta de la jaro 1183. Ĝi estas alta 118 metrojn; 386 ŝtupoj kondukas sur la suprajon de la turo de kie oni guas al la urbo kaj al la ĉirkaŭaĵo, belegan vidajon.

Sur la turo estas lokita granda kupra drako orumita. Kelkaj historis-kribantoj certigas ke tiu ĉi drako estis forportita de Konstantinoplo, sed de la kontoj de 1377 de la urbo rezultas ke la drako estis forĝata de genta metiisto. La drako estas tiel granda kiel bovo kaj pezas 180 kilogramojn. La sonorilego « ROELANT » sonoras okaze de la urbaj festoj kaj solenaj cirkonstancoj. Antaŭe, dum diversaj centjaroj, alvokis la popolo por armigiĝi.

Por viziti la turon sin turni al la pordisto kiu loĝas N° 4, Sankta Bavo Placo. Oni pagas unu frankon po persono, kaj du frankojn po grupo de 2 ĝis 6 personoj.

Flanke de la urbdomo staras restaĵo nomita

### La Mamsuĉanto

Ĝi estas parto de la malnova urba malliberulejo, kaj nur tiu ĉi fronto de ĝi konserviĝis. Tiu malalta reliefaĵo prezentas la bonfaradon. La loka proverbo diras « ke ne estas libera burgo de GENT kiu ne estis dorminte unu nokton sub la sonorilturo.

Ankoraŭ flanke de tiu ĉi lasta monumento staras la

### Halo de drapoj

konstruaĵo de la jaro 1424, en kies salonoj la juĝistraro decidis pri ĉiuj konfliktojn inter la drapistoj aŭ lanistoj ĝis la jaro 1613. En ĉi-tiu jaro la drapa industrio fariĝinta reĝa kunfrataro Sankta Miĥaelo ricevis permeson loĝiĝi en tiun lokon.

Poste, la plej vidinda monumento estas

### La Urbdomo

kui estis konstruata dum diversaj centjaroj, komence de la 1321<sup>a</sup>. Ĝi estas unu el la plej belaj modeloj de gotika arkitekturo ekzistantaj en Belgolando. Kontraŭ la Butervendejo la flankajo estas farita laŭ la renaskiĝa stilo; la parto kontraŭ la strata Alta Pordego estas konstruita laŭ la Renaissance Stilo. La Urbdomo estas malfermita por la publiko ĉiutage; sin turni al la gardisto loĝante flanke de la granda ŝtuparo, dekstre, sur la Butervendejo.

Trapasante la Kokidovendejon ni baldaŭ alvenas al la nova

### Poŝtofiĉejo

starante sur la Grajnovendejo. Oni diras ke ĝi estas unu el la plej belaj kaj precipe utilaj monumentoj el ĉiuj samcelaj el Belgolando.


(Daŭrigota.)

## Intima Festo.

**DIMANĈON, 9<sup>an</sup> de MARTO,** je la 7<sup>a</sup> vespere, en la salonego de nia sidejo: «SALLE DES NOTAIRES,» okazos intima festo organizita de nia grupo. Dum tiu festo oni muzikos, deklamos kaj kantos horojn. Ni faras varman alvokon al ĉiuj niaj geanoj, kiuj havas societajn talentojn por ke ili bonvolu helpi la komitaton por igi tiun feston agrabla kaj amuza.

La eniro en la festosalonon estos senpaga por la membroj kaj iliaj familianoj.

Ĉar estos nia unua intima festo dum kiu niaj gesamideanoj povos pli intime konatiĝi, ni esperas, ke ĉiuj ili faros al si devon ĝin ĉeesti kun sia familio.



## Spritaĵoj.

*Patro.* — Ĉu vi scias, kiu estas la plej mallaborema el via klaso? Estas tiu, kiu restas nenion faranta dum la ceteraj laboras.

*Paŭlo.* — « Jes, estas la instruisto! »

*Instruisto.* — Kia besto havigas al vi la lakton?

*Lernanto.* — Estas la laktovendistino!

*Karolo* (enirante butikon de spicovendisto.) — Sinjoro, du kilogramojn da kafo po 2.15 fr. po kg.; unu kilogramon da sukero po 1.25 kaj paketon da ĉokolado po 1.50 fr. Kiom estas?

*Spicovendisto.* — Estas entute : 4.80 fr. Ĉu mi devas sendi la menditaĵon hejmen?

*Karolo.* — Ne! Ni ricevis tiun kalkulon kiel hejmtaskon kaj volis konvinki min ĉu mia solvo estas ĝusta.

*Juĝisto* (al atestantino) — Kiom aĝa vi estas?

*Atestantino.* — Inter 20 kaj 30 jara.

*Juĝisto.* — Precizigu, mi pelas.

*Atestantino.* — 29 jaroj kaj 11 monatoj!

*Direktoro* (de malliberulejo al du nove alvenintaj.) — Vi devas labori tie-ĉi, sed vi povas elekti la metion de vi preferatan.

1<sup>a</sup> *arestito.* — Mi volas esti bestkvietigisto!

2<sup>a</sup> *arestito.* — Kaj mi, maristo!



*Juĝisto.* — Nu, kulpulo, kio kondukis vin tien-ĉi ?

*Kulpulo.* — La ĝendarmoj, Moŝto !

\* \* \*

## AMUZAĴOJ.

*Edzo.* — Kial vi ĝemas ?

*Edzino.* — Tial ke mi suferas pro laringo..


*Edzo* (interrompante kaj ekkolerante). — Ĉu vi ne ĉeestis, kiam mi ĝin aĉetis ?

*Edzino* (mirsurprizita.) — Kion vi aĉetis ?

*Edzo* (malafable.) — Nu, la ringon pro kiu vi suferas. Sendube, ĝi jam ne plaĉas al vi, kaj vi celas kredi, ke ĝi vin ĝenas kaj doloras.

*Edzino* (levante la okulojn al la ĉielo.) — !!!

## ROKSANO.



Du anĝikoj renkontis unu la alian sur la placo de la Libereco.

— Kiel vi fartas ? diris unu.

— Ne tro bone. respondis la alia.

— Tiom pli malbone. Kion vi faris, de kiam mi ne vidis vin ?

— Mi edzigis.

— Tiom pli bone.

— Ne tiom pli bone, ĉar mi edzigis kun malbona virino.

— Tiom pli malbone.

— Ne tiom pli malbone, ĉar ŝia doto konsistis el 16.000 spesmiloj.

— Tiom pli bone.

— Ne tiom pli bone, ĉar mi elspezis parton de tiu monsumo por ŝafoj kaj ĉiuj mortis sekve de variolo.

— Tiom pli malbone.

— Ne tiom pli malbone, ĉar per la vendo de iliaj feloj mi enspezis pli, ol mi elspezis por la ŝafoj.

— Tiom pli bone

— Ne tiom pli bone, ĉar la domo en kiun mi estis metinta la ŝafofelojn kaj la monon ĵus bruladis.

— Ho ! tiom pli malbone.

— Ne tiom pli malbone, ĉar mia edzino estis en la domo.

El " *Le Chasseur Français* „

Esperantigis ROKSANO.

## HUMORAĴO.

### En la hospitalo.

La Doktoro : (konsultante malsanulon) Kia estas via metio ?

La malsanulo : Muzikisto.

La Doktoro : (al la studentoj) Sinjoroj, la cirkonstancoj tiel of taj de la malsano per kiu suferas tiu-ci malsanulo, donas al mi ree la okazon pruvi al vi ke la penadoj kaŭzitaj en la spira aparato blovante en la muzikiloj estas treege premeantaj.

(Al la malsanulo) : Kian muzikinstrumenton vi uzas ?

La malsanulo : Tamburegon.!!!

## INTERŜANGADO.

(Sub tiu-ĉi rubriko, ĉiu membro povas fari proponon pri interŝangado de Poŝtkartoj ilustritaj, Poŝtmarkoj, Leteroj, Ĵurnaloj, k. t. p.)

Deziras korespondadi kaj interŝanĝi ilustr. p. k. kaj p. m. nur kun fremduloj :

Fino	<i>Eugénie Colyn,</i>	183, Rempart de Plaisance,	Gand.
»	<i>Adrienne Colyn,</i>	id	id.
»	<i>Irma De Vlieger,</i>	15, Place de l'Ecluse,	id.
»	<i>Fouquet,</i>	28, Rue du Mouton,	id.
»	<i>Schepens,</i>	14, Rue Ch-Louis Dierickx	id.
»	<i>O. Standaert</i>	66, Rue Savaen	id.
»	<i>Suz. Van Hylfte,</i>	228, Rempart de la Biloque,	id.
»	<i>Claire Verschueren</i>	91, Rue Joseph Plateau,	id.
Sro	<i>Georges Dezutter,</i>	76, Pêcherie,	id.
»	<i>Ernest Simonis,</i>	55, Rue des Entrepreneurs	Mt-St-Amand. (Gand)
»	<i>Flor. Van Cleemput,</i>	137, Bd. de la Citadelle,	Gand.
»	<i>Vermandere,</i>	85, Rue de la Bienfaisance,	id.

ĈE LA REDAKTEJO : oni akceptas tre dankeme poŝtmarkojn, ne nur maloftajn por kolektajo, sed ankaŭ ĉiuspecajn; ankaŭ ne-ilustritajn poŝtkartojn, banderolojn por Ĵurnaloj kaj kartleterojn. Oni sendos interŝanĝe ĉion pri kio oni petos (ilustritajn poŝtkartojn, ĵurnalojn, librojn, k. t. p.)

## Bibliografio.

*La redakcio recenzos pri ĉiu esperanta verko, sendita po du ekzempleroj, al la ĉefredaktoro.*

*Esperantistoj ! Favorizu la magazenojn kaj personojn, kiuj anoncas en nia " Bulteno „ kaj diru al la vendistoj, ke vi estas Esperantistoj !*

## Por la Filatelistoj!

Nia grupo intencas starigi sekcion por filatelistoj, t. e. kolektistoj de poŝtmarkoj. Ne nur niaj membroj sed ankaŭ disaj esperantistoj, kaj eĉ neesperantistoj povas aniĝi la novan sekcion.

La celo de tiu societeto estas faciligi kaj favorizi al ĉiuj la interŝanĝadon, aĉetadon, vendadon, lotumadon, k. t. p. ne nur de poŝtmarkoj, sed ankaŭ de poŝtkartoj ilustritaj, moneroj, kromoj, kaj ĉiuspecaj kolektajoj. Oni akceptos membroj el ĉiuj partoj de Belgujo kaj de fremdaj landoj.

Nenia kotizajo estos postulata. - La membroj tamen devos submetigi je la regularo, kiu aperos en posta bulteno, kaj promesi, je l'honoro, ĉiam respondi, almenaŭ unu fojon, al siaj korespondantoj.

Por aliĝi la "Filatelian sekcion., sendu vian nomon kaj legeblan adreson al la ĉefredaktoro de la "Bulteno., rue de Gand, 34, **Mont-Saint-Amand** (Belgujo.)



Havebla ĉe la Redaktejo :

En vente au bureau de la Rédaction :

Te verkrijgen op het bureau van het Tijdschrift :

**Spraakleer en Oefeningen der Hulpwereldtaal**

**ESPERANTO**

— door MICHEL SEBRUYNS. —

Prezo : 1 franko, poŝtmandate aŭ kontraŭ poŝtmarkoj.

Prix : 1 franc, contre mandat ou timbres-poste.

Prijs : 1 frank, tegen mandaat of postzegels.

---

*Esperantistes! Favorisez les firmes et les personnes, qui font de la réclame dans notre " Bulletin ,, et dans les magasins, où vous achetez, dites que vous êtes Espérantistes!*

---

*Esperantisten! Bevoordeeligt de magazijnen en de personen, die aankondigen in ons " Bulletin ,, plaatsen en, in de magazijnen, waar gij uwe aankopen doet, zegt dat gij Esperantisten zijt.*